



# « LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE » SALUTAS VIN !



## Bonvenigaj vortoj

« Kiu tro certas pri sia vero, kreas inferon sur la tero ».

Marjorie Boulton

## Enhavo

- Sarta esperanta historio
- La monata Zeo
- Kio nova en nia retejo ?
- Lokaj aktualaĵoj pri Eo

## La monata Zeo

En la fejsbuka grupo : **ZEO-j**

Zamenhof kaj Esperanto Objektoj

Ĉu ne ???



## Kio nova en nia retejo ?

06/06/2022 Tago de la GEM

06/09/2022 Tri gravaj iloj

23/05/2022 Legilo (nova versio)

18/05/2022 Kuketoj

Ulrich Lins – La danĝera lingvo

<https://www.youtube.com/watch?v=7m5R0ztMHOg>

## Sarta historio pri Esperanto



Raphaël ÉLIZÉ

## (Jean Marie Joseph Raphaël ÉLIZÉ)

Li naskiĝis la 4-an de februaro 1891 en la urbo Lamentin, insulo Martiniko, Francio.

Li mortis la 9-an de februaro 1945 en la koncentrejo Buchenwald, Germanio.

Tiu viro kun eksterordinara kariero estis la unua kaj sola neblanka urbestro en la metropolo, en la urbo Sablé-sur-Sarthe, de 1929 ĝis 1940.

Filo de impostisto, Raphaël alvenis al la metropolo kiam li estis 11 jara. Liaj gepatroj fuĝis el Saint-Pierre ĵus antaŭ la katastrofa eksplodo de La Monto Pelée kiu kaŭzis tridek mil mortojn en majo 1902, kaj kiu komplete detruis tiun urbon, tiam prefektejon de Martiniko.

Post siaj studoj en parizaj liceoj, li aliĝis al la bestlernejo de la urbo Lyon en 1910. Raphaël ricevis la diplomon de bestkuracisto, unu monaton antaŭ la komenco de la Unua Mondmilito.

Asignita al la kolonia infanterio, li militis unue kiel soldato kaj poste kiel bestkuracisto kaj lia kuraĝo akirigis al li la medalon « Croix de Guerre ».

Dum liaj gepatroj iris ree al Karibio, li ekloĝis en la departemento Sarthe, kie la bezono de bestkuracistoj estis granda.

La politiko pasiigis lin kaj en 1924 li aliĝis al la loka sekcio de la SFIO (socialisma politika partio). Unue municipa konsilisto, li poste estis elektita urbestro de Sablé-sur-Sarthe en 1929, iĝante tiel la unua miksrasa urbestro en la eŭropa parto de Francio.

## Raphaël ÉLIZÉ

Li estis urbestro ĝis 1940, kiam la okupanto eksigis lin pro rasaj kialoj ĉar "estas neelteneble por la germana armeo kaj rekoni neblankulon kiel urbestron en okupata teritorio kaj diskuti kun li" laŭ la teksto de la Feldkommandantur de Le Mans.



Por li, akiri mandaton kiel urbestro estis grandega sukceso en tiu tempo de altiĝanta maltoleremo. Kiel viziulo, kaj longe antaŭ la « Front Populaire » (unio de maldekstraj francaj partioj), li praktikis tre fortan socian politikon. La urbo estis plibeligita kaj modernigita: akuŝejo, urba lernejo por knabinoj, urba kantino, futbalkampo, kaj ankaŭ la unua oficiale aprobita naĝejo en la okcidento parto de Francio...

Favora al tiu internacia lingvo, Esperanto, li kontribuis al la kreado de esperanto-grupo, de Esperanto-kursoj kaj esprimis la deziron, ke ĝi estu instruata, disvolvata kaj enkondukata iom post iom en la lernejajn programojn.

Unue mobilizita en septembro 1939 kiel bestkuracisto en la urbo Hirson en la departemento Aisne, li estis malmobilizita en 1940. Reen en Sablé, li insistis ĉe la prefekto, por ke tiu ĉi redonu al li lian mandaton kiel urbestro. La okupanto rifuzis tion pro lia haŭtkoloro, kiu malkongruis kun la urbestrofico.

Forigita, Élizé rekomencis sian laboron kaj aktive partoprenis en la Rezistado, precipe per disponigado de informoj kolektitaj dum la ekzercado de sia profesio.

Denuncita kaj arestita en septembro 1943, li estis malliberigita en Francio antaŭ ol esti finfine deportita al la koncentrejo Buchenwald la 17-an de januaro 1944.

Grave vundita dum la Aliancita bombado de la armilfabriko la 9-an de februaro 1945, li mortis en Buchenwald la vesperon mem.

Por honoro al li, la placo de la urbodomo de Sablé nomiĝas « Raphaël Elizé » ekde la fino de la Dua Mondmilito.

Ankaŭ en Le Mans, ekde 2011 placo estas dediĉita al li.

En 2013 Philippe Baron reĝisoris la filmon: "Le métis de la République" (la miksrasulo de la Respubliko).

En 2015, la liceo de Sablé estis renomita "Lycée Raphaël Élizé".

### *Sablé Sur Sarthe*



### *Le Mans*



### KOMPATINDAJ BRAZILANOJ

En la urbo Iguazu, estis la unua fojo, kiam ni vidis malriĉulojn.

La kvartalo de la stacidomo altiras la malriĉajn homojn. Pro la denseco de la trafiko kaj de la uzantoj de la busoj, multaj homoj havas malgravajn laborojn: maljunaj homoj vendas freŝajn trinkaĵojn, saketojn da kukoj, bombonojn, poŝtkartojn, kaj diversajn malmultekostajn objektojn.

Geknaboj portas skatolojn por ciri la ŝuojn. Je ĉiu alveno de busoj, ili tumultiĝas per krioj, bruoj, muzikoj, movoj... kiel muŝoj.

Tiuj homoj estas sufiĉe ĝojaj: ili havas iom da mono. Sed ekzistas pli malriĉaj homoj.

Mi vidis ilin sidantaj sur la trotuaroj, malbone vestitaj, malpuraj, malsanaj, malsataj kaj tre malĝojaj.

Ĉefe estas virinoj kun multaj infanetoj. Ili mamnutras bebojn. Almenaŭ ĉi tiuj estas nutritaj!

Sed la pli aĝaj estas malsataj: ili eĉ ne ludis! Kaj oni povas vidi en iliaj okuloj la tutan mizeron de la mondo.

La sekvantan matenon, ni vidis infanojn en kartonaj skatoloj. Multaj inter ili ne havas gepatrojn. Ili havas nek domon nek liton kaj ili dormas ekstere ... meze de la seninteresiĝo de la preterpasantoj.

### LA AKVOFALO IGUAZU

Post bona nokto en hotelĉambro, ni reekveturis por viziti la famajn kaskadojn Iguazu, per taksio kun nia propra ŝoforo. Ili situas sur tri landlimoj. De la ponto super la rivero Parana, ni samtempe povis foti la brazilan, la argentinan kaj la paragvajajn pejzaĝojn.

Tiuj kaskadoj estas grandegaj. En la indiana lingvo "Iguazu" signifas "Granda Akvo". Multaj indianaj legendoj klarigas la devenon de tiuj kaskadoj kaj diras la rakonton pri malbenitaj geamantoj.

Tiuj akvofaloj estas la plej ampleksaj en la mondo. Ili estas pli imponaj ol la kaskadegoj de Niagaro kaj Zambezo. Ĉe rando je du kilometroj estas videblaj pli ol ducent kaskadoj: kaskadetoj sed ankaŭ kaskadegoj. La plej granda estas sepdek du metrojn alta kaj Niagaro estas kvindek ses metrojn alta.



Unue la ŝoforo kondukis nin sur la argentinan flankon, kie ni paŝis sur ponteto super la rivero Parana ĝis la Truo de la Diablo. Poste li kondukis nin ĝis la brazila flanko, kie la vidaĵo estas la plej bela. La spektaklo estas tre impresa. Apud Iguazu troviĝas la plej granda akvobaraĵo en la mondo: Itaipu, kiu signifas "la Kantanta Ŝtono". Tiu baraĵo estas trifoje pli ampleksa ol la Asuan-baraĵo. Iuj brazilanoj kritikis ĝian konstruadon pro la kosto.

Posttagmeze ni vizitis la magazenojn de la urbeto. La vendistinoj sekvis nin pro la multaj ŝteloj. Por ni, francoj, la objektoj estis malmultekostaj kaj ni havis la impreson esti tre riĉaj. Sed, malfeliĉe, sur la trotuaroj ni renkontis la samajn malriĉulojn kiel matene.

Je la dudeka, ni reekveturis al San-Paŭlo. La tutan nokton ni vojaĝis per aŭtobuso.



Baldaŭ okazos la Zamenhofa Tago 2022, la 15an de decembro  
Ne forgesu tiun gravan tagon en Esperantujo !